



Bimestriel culturel d'information & d' expression espérantiste  
Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista. Unu n°:2F

Eldonas: Cercle espérantiste de l'Agénais 47340 Laroque Timbaut  
Poŝtkonto: 3 371 74 M Bordeaux  
\*\*\*\*\*  
Abono por unu jaro : 12 FF (10 FF por Francio)  
al la ĉi-apuda pĉk.

## " LA RAJTON LABORI ! "

- La rajton labori !
  - Ĉu la rajton je l'salajreco ? La rajton je l'servuto ?...
- Jen tamen kion postulas la gvidantoj de l'maldekstro.  
"La rajton labori!..." Kion oni ja povas diri pro demagogio!  
Tiel do, la kapitalistoj, la burĝoj, la grandaj industriistoj  
ne plu estas ekspluatantoj ? Ĉu do la laboristoj, la sindikat-  
istoj, ne plu deziras la malaperon de la salajra sistemo ?  
Ĉu la sklavoj bedaŭras siajn katenojn ? Ĉu do pravis la sklav-  
igistoj ? Ĉu do kasto de elitoj, de sinjoroj, nepre necesas ?
- Nu, gekamaradoj ! Reagu, postulu la rajton vivi, ne la rajton labori ! Labori por vivi ? Jes. Vivi por labori ? Ne.  
La rajto je ferio ? Jes. La rajto je l'servuto ? Plej ĝuu ĝin  
... sed ne postulu ĝin por aliaj...

Se la moderna tekniko produktas rapide, abunde, ĉiuj devas profiti de tio. Se necesas malpli da laboro, oni malpli laboru, oni donu vivrimedojn al la nebezonatoj. Nenion valoras ĉiuj argumentoj, kiujn elvokas kontraŭ tio la sinjoroj.

Ha, jes, mi scias... Endas, ke la materialo profitdonu, ke oni produktu enspezojn, rentojn, por tiu, kiu ĝin liveras... Oni prave volas malaperigi la kapitalismon. Sed anstataŭigi ĝin per ŝtatismo, tio estas ŝanĝi nur la specon de l'servuto.

Endas anstataŭigi ĝin per kolektiva kaj interfrata proprieto, kiu eble restas kreata...

Ĉio tio kontraŭas al la eduko, kiun en la lernejoj la burĝaro trudis al la popolo...: la nobleco de l'laboro, ktp. Endis, ke la popolo, laŭdire liberigita el la servuto, restu je la servo de la burĝaro kaj tion ŝatu; ke ĝi produktu profiton por la mono kaj tion trovu normala.

Sed la burĝa kapitalismo preterpasis sian kulminon. Komenciĝis ĝia regreso, eĉ ĝia agonio. Kiom da tempo ĝi plu daŭros? Mi ne estas divenisto... Al vi, laboristoj, la taskon ĝin mallongigi, lernante vivi sen mastroj.

M. Barry

"La Chevalerie", F 37150 LA CROIX

(El la bulteno "Vivre libre", dissendata de la verkinto mem, trad. Kribo).

Tiu eta kontribuo ne povas roli kiel enkonduko por larĝa debato pri la temo "Alergio kontraŭ laboro", kiun ni pritraktos en la regiona renkontiĝo en CLAIRAC (Lotgaronio), la 6an de majo. Sed ĝi almenaŭ reliefigas pri la problemo aspekton, kiu malofte troveblas en la politikistaj paroladoj kaj tamen, laŭ mi, plej gravas. Labori? Jes, sed kiel, kaj por kio? Al tiuj, kiuj volas havi plej objektivan vidpunkton pri la afero kaj la nuna sinteno de la laboristaro pri laboro mi povas nur varme rekomendi la libron "L'allergie au travail" de Jean Rousselet (Editions du Seuil, poŝkolekto "Actuels", n°A20, prezo: 11,30 FF).  
Kribo.

\*\*\*\*\*

Pri la SAT-Amikara kongreso en AVINJONO : Foje, fine de kongreso, oni retro-

rigardas al ĝi kaj esprimas kritikojn - en la plej larĝa signifo de tiu vorto, kompreneble. Relative multaj gelegantoj de "Laŭte!" ĉeestis en Avinjono. Certe estos interese por la eventualaj aranĝantoj de venontaj - ĉiuspecaj - kongresoj, ke esprimiĝu en "Laŭte!" ĉies kritikoj pri la ĵusa okazaĵo en Avinjono. Ne nur la kutimaj laŭdoj, kiujn neduble meritas tiu kongreso, sed ankaŭ la sugestoj por ankoraŭ plibonigi la aranĝojn kaj ties etoson...

En "Le Monde" de 79 04 16 : duonpaĝo de H.Masson pri Esp-o!

Progresi (4) :

PROGRESI, PAROLANTE ...

- Progresi per aŭskultado, progresi instruante... Bone. Sed ŝajnas al mi, Felikso, ke oni iom rapide jam transiris de la pasiva alkutimiĝo al la E-parolmaniero al la plej aktiva E-praktikado. Ne ĉiu kuraĝas tiel salti de la radioricevilo ĝis la nigra tabulo! Antaŭe, povas ekzisti stadio tre profitdona, nome la alkutimiĝo al buŝa uzado de la lingvo, ĉu ne?
- Jako, ci pravas. Kaj des pli meritoplena estas nia kamarado Sevilla, kiu ja ne povis antaŭe multe lertiĝi per lokaj esperantistaj renkontiĝoj en sia urbeto! Li mem estis la nura esperantisto surloke...
- Jes, nun li troviĝas vole nevole en la bano kaj fariĝis animanto de rondeto. Ĉar li komencis jam en la kurso ekskluzive uzi esperanton, ne estos malfacile al li tutsimple daŭrigi tiun uzadon en progresigaj konversacioj kun la lernantaro jam fininta la unuagradan kurson. Kaj, ĉar kdo Sevilla uzis kvazaŭ rektan metodon, siaflanke la progresantoj ne bezonos multe suferi, balbutante frazojn laŭvorte tradukitajn, ĉar ili jam enkapigis en la unuagrada kurso sufiĉe da rekte uzebla lingvomaterialo kaj tuj de la komenco venkis la lingvobaron. Dank'al la konversacioj kun sia animanto pri plej diversaj temoj, ili ĉiuj progresos, pliriĉigante sian vorttrezoron kaj definitive fiksante en sia kapo la sintakson de la lingvo.
- Sed, Jako, kion fari en rondo, kiu arigas ekzemple ĉiumonate, diversajn izolitajn geamikojn, kiuj eble lernis per korespondado?
- Felikso, tiu kazo estas tre ofta kaj certe tiam leviĝas pli da problemoj! Sed eĉ en tia rondo certe troviĝas unu du personoj, kiuj - eble ĉar ili estas nature babilemaj aŭ kuraĝaj, aŭ tutsimple ĉar ili aliloke "malnodis sian langon" - povas animi la aferon. Ili ne nur povas sed ja devas. Kaj ili ne pretekstu, ke iuj ko-

mencantoj ne ĉion komprenas, por pigre silenti aŭ krokodili.

- Jes, for la krokodilojn !
- He, Felikso, ne tiel draste ! ne tiel sendistinge ! Oni zorge atentu pri grava afero : la etoso de la kunveno. Oni ne moku nek kondamnu aŭtentan komencanton, kiu nature timas paroli publike kaj kiu rapide perdas sian vortprovizon antaŭ deko da orel-kaj okul-paroj ! Mi male subtenas la herezan opinion, ke oni ne trudu paroli esperanton al komencanto en kunveno, per diversaj rimedoj, ekzemple per la plej stulta : monpuno pro ĉiu nacilingvaĵo ! Monplena farsulo tutsimple tuj donu ĉekon komence, kaj krokodilu komforte la tutan horon !
- Laŭ mi, la "lertuloj" devas senti la devon uzi esperanton por helpi al la komencantoj. Kaj ĉi-lastaj ne hezitu peti de la pli lertaj nepre paroli en esperanto, se okazas "forgeso". Ili petu ankaŭ malrapidecon, se la elokvento (aŭ la propra timo !) akcelas la parolfluon.
- Do, Jako, apliki la moton : "Ĉiam laŭte, malrapide kaj en esperanto !" ?
- Kompreneble. Sed la malrapideco ne sufoku la spontanecon !
- Tamen, kiel krei favoran etoson, por ke la komencantoj kuraĝu ekparoli, por ke la lertuloj emu babilon, ktp ?
- Felikso, ci pardonu al mi, sed mi konfesas mian nekapablon liveri kontentigan respondon. La afero dependas de tro multaj faktoroj, kiujn necesus esplori aparte. Mi esperas, ke kompetenta legant-in-o helpos nin ĉi-rilate. Mi mem plej ofte improvizas, blagas, uzas plej klaŭnajn rimedojn, por atingi simplan celon : ke oni almenaŭ ridu unufoje en kunveno.
- Jes ja, la malkonstipilo, ĉu ne ?
- Trafe ! Vivu la sekprunoj !
- La red. de "Laŭte !" : Gefarsuloj, ne konsideru "Laŭte !" kiel rimedon por reklami viajn regionajn fruktojn ! For la regionismon ! Kaj prefere legu kun mi kaj kun respekto jenajn dirojn de nia Majstro :

"...Izolitaĵoj esperantistoj, kiuj neniam havis la eblon praktike apliki tion, kion ili lernis, ofte dubas, ĉu efektive per Esperanto oni povas tute bone interkompreniĝi. Eĉ interne de la Esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperas ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malgraŭvole ne povas liberigi sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria ol praktika. Sed kiam la balbutanto venas al kongreso, kie li havas la eblon aŭdi bonajn kaj spertajn esperantistajn oratorojn, kiam li persiaj propraj oreloj kaj okuloj konvinkiĝas, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, li entuziasmiĝas, li vidas, ke li laboras por io viva kaj vivoplena, li revenas hejmen kun nova kuraĝo kaj energio..."

- Brave ! Vivu tiu barbulo-okulisto, kiu tiel klare vidis !
- Ĵaklino : Amen.

\*\*\*\*\*

Ni ricevis jenon de kdo Captein, responde al artikolo aperinta en bulteno, kiun li ne plu volas aboni, sed tamen telepatie plu legas kaj al kiu li volas plu kontribui. Pro tio, ke nek la red. de "Laŭte!" nek la abonantaro praktikas telepation, kdo Captein sendis la tajpitan artikolon per la poŝto. Dankon pro tiu komplezo ! Red.

"Dediĉite al Kdo Sevilla, verkinto de la frontartikolo marta en Laŭte.

K V A Z A Ŭ T R O G O E N N O R I O

Klik-klak, klik-klak, klik-klak. Mi memoras tiun sonon de norio. Estis en la jaro 1934a, kiam mi piedvojaĝis de Hago al Valencio por ĉeesti la SAT-kongreson, ke mi en Hispanio vidis la arabdevenan maŝinon por ĉerpi akvon el putro. La motoro de la maŝino ne estis elektra nek havis duĉvfortan benzinmotoron, sed estis azeno, kiu daŭre rond-iris la puton kaj funkciigis la trogĉenon. Klik-klak... sekvis silento... la azeno haltis eble pro soifo, malsato aŭ laciĝo. Tiam el

ombra kabano aŭdigis forta krio. Al mi ĝi sonis kiel AETU ! (antabeneru) kaj la povra burro denove ekiras la rondiran laboron. La kompatinda besto estis tiel jungita, ke ĝi devige faras la rondiron. Cetere la okuloj estis blindige kovritaj, do ĝi ne rimarkis ke malgraŭ la multaj kilometroj ĝi restis sur sama loko. Ĝi ne progresis.

Klik-klak, klik-klak, klik-klak sonis la norio. Estis en 1934 ke mi vidis ilin. Nun post 45 jaroj mi ekscias la nomon en esperanto de la maŝino. Dank'al Kdo Sevilla (\*) mi nun lernis la vorton. En PIV mi legis, ke la ĉerpujojn oni nomas ja trogoj, kaj nun mi povas bone kompreni la esprimon de Kdo Sevilla : reveni al la lernolibro kvazaŭ trogo en norio. Ĉiu trogo estas leciono. Se la trogoj havus numeron, post la lasta denove aperus la unua, dua, ktp. Do ripetado, ripetado kiel la trotado de la azeno.

Laŭdinde ankaŭ estas, ke gvidi kurson estas la plej bona maniero al progresoj. Al la gvidanto progresas la lingvokapablo kaj al la disvastigo de Esperanto progresas la nombro de esperantistoj.

Trie mi volas laŭdi la diron, ke paroli esperante estas nepre necese tuj en la kurso; ankaŭ "kvazaŭ trogo en norio", paroli estas kiam la akvo fluas el la trogo en la kanaletto al la kampo. La spaco inter du trogoj estas la teorio sekvata de paroloj kiel akvo el la trogo dua.

Tre laŭdinda mi trovas la sukceson pro la 13 esp-libroj en la urba biblioteko.

Mi estas scivola, ĉu la norioj en Hispanio ankoraŭ funkcias. Eble jes per elektra motoro.

Danke salutas Captein.

(\*)kaj ankaŭ iomete dank'al la telepatia legado de "Laŭte!", kompreneble! (aldono de la red.)

"Laŭte!" fariĝas vera gazeto ! Imagu, ni registris, post la malabono de kdo Captein, la duan oficialan malabonon ! Dankon al kdo Alber, kiu tre ĝentile sendis malabonan leteron ! Domage, tamen, ke la motivo ne estas tre preciza...

"Pro malŝatoj kaj malkonsentoj kontraŭ la moralaj kaj politikaj vidpunktoj esprimitaj en laŭte; almenaŭ kontraŭ la plejparto; mi vin sciigas ke mi ne daŭrigos mian abonon. Tial neniel utilos sendi à (tiel!) mi la novan adresaron, nek enlistigi min en ĝi. Salutas vin Alber."

Moralo kaj politiko en Laŭte ? Neimageble ! Kie tio kaŝiĝas?

Se estas tiaj grandiozaj aferoj en "Laŭte!", estas neeviteble, ke, pro ĉies rajto havi proprajn etikon kaj politikajn ideojn kaj pro la rajto esprimi ilin en la bulteno, estas diferencoj inter la diversaj esprimitaj vidpunktoj. Ĉu tiuj diferencoj estas tiel ĝenaj, ke ili fariĝas neelteneblaj al iuj abonantoj ? Aŭ ĉu male al aliaj ili aspektas riĉigaj ? Ne eblas bilanci, kiam temas pri sentoj kaj impresoj. Vero estas, ke alvenas multe pli da laŭdaj leteroj ol da riproĉaj (ni ne kutimas publikigi la laŭdojn, kiam ili ne estas senditaj tiucele). Vero ankaŭ, ke la nombro da abonoj duobliĝis de 1976 ĝis nun, restante tamen tre modesta (210 komence de aprilo).

Adiaŭ, do, al Alber, kaj dankon pro liaj iamaj artikoloj, kiuj certe kontribuis fari el "Laŭte!" tion, kio ĝi estas nun. La red.

La red. jam sufiĉe klaĉis, parolu la kasisto :

Financa bilanco de "Laŭte!" por 1978

\*\*\*\*\*

Abonoj	1954.	Eldonado	1443,50
Donacoj	194,60	Afrankado	210,04
Diversaĵoj	32,80	Diversaĵoj	38,48

+ 2181,40

- 1692,02

Saldo : 489,38 Antaŭa saldo : 119,30. Nova saldo: 608,68.

\*\*\*\*\*

Jam pluraj E-grupoj rolas kiel perantoj de "Laŭte!" en iuj regionoj de Francio (Ĝirondio, Tuluzo...). La legantaro el Pikardio bonvolu noti la adreson de la peranto en sia regiono : LE RADIS NOIR, BP.11 - F 60400 NOYON.

Dankon pro tiu valora helpo !

Kdo Vito rimarkis kaj rimarkigas al ni, ke "Laŭte!" ne aperas en listo de periodaĵoj en la jarlibro de UEA.

Respondo: Ni sendis "Laŭte!"n al UEA tiucele, sed UEA ne volis mencii ĝin, pro tio ke ĝi estas regiona kaj tro nova. La afero ne estas grava. Kaj ni ne estas revengemaj : kiam "Laŭte!" havos tiom da abonantoj kiom "Esperanto", ni promesas, ke ni mencios la UEA-organon en la Adresaro de "Laŭte!".

Al kdo Vito ne mankas aŭdaco, kiel vi povos nun konstati legante jenan lian sugeston :

## Laboriga propagando

\*\*\*\*\*

Laborigu viajn gekonatojn, viajn laborkamaradojn, viajn kontraŭantojn. Estas multe pli efike ol propagandi por Esperanto. Unue, la plej multaj homoj volonte helpas aliajn, sed malofte ricevas okazon tion fari (oni ĉiam petas de la samaj personoj). Due, se vi petas de la taŭga persono, la laboro estos verŝajne farita pli bone ol vi mem povus fari. Tria, vi ne bezonos altrudi Esperanton kiel fremdaĵon, la petinto frue-malfrue petos vin informi pri la I.L.

Kelkfoje estas multe pli temporaba peti aliajn ol fari mem, precipe (se temas pri) timemaj aŭ maliniciatemaj homoj, sed aliflanke la plej streĉigaj kunlaboroj ofte estas plej fruktodonaj. Elektu prefere iom solajn, "malsamajn" personojn, sen aparta asocia membreco - t.e. la "forgesitojn" inter via konataro. Estu pacienca, tolerema, kaj mi promesas mirigajn rezultojn. Vito.

\*\*\*\*\*

B O T A N I K O : El letero de kdo Alain MATSCHEK :

"Al vi mi skribas pri la botanika problemo de la numero 17a de via dumonata revuo "Laŭte!". Botaniko interesege min kaj la enrevuigita problemo multe maltrankviligis mian dormotempon. Mi tute ne scias, ĉu mi solvis la enigmon rilate la buterfloron de l'diablo. Sed mi informiĝis pri butero kaj floroj kaj diablo.

Multaj geamikoj miaj diris al mi, ke en ilia regiono populara kutimo konsistas en tio, ke iu proksimigas flavan floron al ies gorĝo (la verkinto verŝajne erare skribis "malproksimigas")(red). Tiu floro estas ranunkolo. Se ties gorĝo koloriĝas flaven, oni diras : "vi amas buteron". Se ties gorĝo ne ŝanĝas sian koloron pro la lumo reflektata de la ranunkolo, oni diras : "vi ne amas buteron".

Eble mi pligrandigis la problemon anstataŭ ĝin solvi. Ĉar la diabla aŭ toksa ranunkolo estas ranunkolaco sed ne kompozitaco. Sed kial la buterfloro de la diablo estis envortarigata ĉe la substantivo Leontodo ? Eble en Polio kaj dum sia infan-tempo Zamenhof ludis buterfloron per iu leontodo. Sed per kiu leontodo ?

Do mi ne solvis la problemon ! " sed vidu p.17!

\*\*\*\*\*

Nun ankoraŭ pli serioze, ĉar jen nia ....

## ... L I N G V A R U B R I K O

\*\*\*\*\*

Letero de Jean-Claude :

" - Solvo al la salikokeca ludo, kiu, same kiel la samnoma besteto, progresigas, retroirigante. La akuzativan eraron mi trovis ĉe paĝo 2a (de Laŭte n-ro 17):

"...Malsuprenirante funde de l'maroj..." mi diras : "malsuprenirante funde de l'maroj..."

Stulta ludo ? Des pli bone ! Ju pli da stultoj, des pli da ridoj ! Kaj mi kisos ankoraŭ pli volonte se temas pri kulpulino."

Respondo de la stencilulo : Fulmotondro ! Tiun eraron mi ne malkovris ! Mi celis ja tiun ĉi (p.3) :

"...ĉio ĉi trudas ekkonsideri la plioftigon de "Laŭte!", se ne kiel nepre necesa (N), almenaŭ kiel konsilinda (N) paŝo(N)" Jean-Claude rajtas do la kison, kaj, obee al lia prefero, mi petos de mia dulcineo plenumi la devon. Ha, kiel stulta ludo!

Aliaj rimark(ig)oj de Jean-Claude pri la sama numero :

Paĝo 19 : La esprimo "Al kaoso, mia kara, al kaoso..." mi prefere redaktus : "al kaoso, kara mia, al kaoso" laŭ la itala maniero. Tiel, ĝi ŝajnas al mi pli ritma, pli leĝera, pli facile direbla. Kaj al vi ?

Paĝo 14 mi legas : "...De kiam la minaj kompanioj DAÛRE prospektadas eĉ ekster tiu teritorio..."

Mi komprenas la frazon tiusence : La prospektado ankoraŭ daŭras.

Nu, vidu ni P.V. de Waringhien al DAÛRE. RIM.: "Malkonsilinda estas la uzo de DAÛRE samsence kiel PLU, ĉar ili ne estas sinonimaj : Daŭre labori signifas propre LONGTEMPE labori, sed korekte ĝi ne povas signifi daŭrigi la laboron, PLUE labori".

Sed mi legas, el Z. mem : "Dum Esp-o DAÛRE vivas, Volapük jam longe estas mortinta".

Kiu pravas ? Ĉar ofte mi vidis DAÛRE, uzata samsence kiel PLU."

\* \*

Jen ankoraŭ pli stulta ludo, kiun akompanis letero de amiko J. MANCEAU :

"...ĉi-enen mi enmetas tekston detradukitan el la franca, ĉefe pere de franca-esperanta vortaro. La originalo estas verŝajne specimeno el iu aŭtoro de la skolo "la Nova Romano".

La Eo-tradukinto intencis ĝin submeti al la juĝo de la internacia konkurso, okaze de internacia kongreso, sekcio "Tradukita Prozo", por samtempe konigi la novmodan (jam ne plu) francan kulturon. Sed post pripenso, ŝajnas ke tiu teksto bezonas ankoraŭ iomete da polurado, sed ni ne disponas pri la originalo en la franca. Eble leganto de "Laŭte" povos helpi, rekonstruante tiun francan tekston kaj poste referante la tradukon en zamenhofa Esperanto; cetere, nur ĉi-lastan ni bezonas.

Tion oni povus nomi "pri trafa uzado de plurlingva vortaro", aŭ "kial la tradukmaŝinoj ankoraŭ fiaskas".

RETRADUKU EN KOREKTAN ESPERANTON TIUN DUBAN DETRADUKON  
EL LA FRANCA :

"Tuj ke li alvenis, mi diris al li tute de sekvo : "Mi venas de manĝi kaj nun mi estas en trajno legi, mi ne volas paroli kun tedulo, kaj mi aldonis : li agas sin pri vi !" Kiam mi diris tion, li havis la areon teditan, kaj tute de sekvo, li foriris.

Mi pensis tiam : mi ĝin havas eskapi bela !  
Mi volis legi denove, kiam ĝi metis sin al pluvi; mi pensis de tiu legado : mi havas bela fari, mi tie ne alvenas, kaj mi forlasis la ĝardeno kaj reeniris en la domo en min diranta mi ne la forlasos plu hodiaŭ, ĉar mi timas ke ĝi ne pluvu denove; ĝi estas la risko de la monato de marto; kaj mi diris al mi ankoraŭ : mi ne iras atendi ĝis al ke la butikoj fermu; ĝuste antaŭ tagmezo, mi iros por serĉi la kokidon ĉe la bakisto kiun mi donis al rosti."

Nu !...

\*\*\*\*\*

Vi, kiu vidu vidigantojn ! Memore al doktoro Zamenhof, kiu estis okulkuracisto, fondiĝis la movado "Esperantistoj Esperigas Esperantojn", kiu celas helpi al la kuracado de resanigeblaj blinduloj en la Tria Mondo. Nun tiu movado planas helpi al la malsanulejo de Ndoungué, en Kamerunio, kaj bezonas monon por financi :

- kliniketon el dek litoj - instrumentojn por okulkuracado  
- dujaran salajron por kroma flegistino - aŭtobuseton.  
Adreso : Operacio "Lumo por Kamerunio", ĉe Jacques TUINDER, Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH HEEMSKERK, Nederlando.  
poŝtĉekkonto n° 10 20 100 je la nomo de J.A. TUINDER,  
Heemskerk (menciu : "Lumo por Kamerunio").

V I V O en la E S P E R A N T O - G R U P O J  
\*\*\*\*\*  
(rubriko uzebla de ĉiu ajn grupo el ie ajn)

\* Ĝ I R O N D I A " O N T A " V I V O  
\*\*\*\*\*

La ĝirondia ĉeestantaro, multnombra, en la SAT-Amikara kongreso en Avignon, kunvenis kaj decidis :

- Ni tuj rilatos kun la Seminario por Instruistoj en Mérignac por okazigi prelegon pri E. kun la gelernantoj.
- Nia maja kunveno okazos sabate la 12an de majo en la kamara domo de Gaïta kaj Leo ROBERT en Larrat (\*). Ili atentos nin ekde la 10a horo. Ĉiuj kunportos manĝaĵon por pikniki, ĉu ekstere, ĉu interne, laŭ la vetero. Ĉiuj kursgvidantoj invitos siajn gelernantojn. Posttagmeze ni piediros tra la kamparo.
- Nia junia kunveno okazos sabate la 23an de junio en Le Canon - Cap Ferret ĉe nia tiea kdino Henriette CHAILLOT. La rendezuo estas antaŭvidita je la 10a horo antaŭ la urbo-domo. Ni gustumos ostrojn ; tamen ĉiuj kunportu manĝaĵon por tagmanĝi. Ni piediros tra la dunoj ĝis la Oceano. Ĝis baldaŭ !

(\*)

Joël

Por atingi la vilaĝeton "Larrat" :

Laŭ la ĉefvojo N 10 venante de Bordojo direkte al Parizo : ĉ. 6 km post fino de la aŭtovojo trairu la tutan vilaĝeton "Bois de Lion", eĉ preteriru ĝin. Proksimume 200 m. post la lastelasta dometo tre malnova turnu maldekstren laŭ la sageto "ROUX". Daŭrigu laŭ la sama direkto ĉirkaŭ unu kilometron ĝis vi vidos la sageton "LARRAT" al maldekstro.

La rendezloko situas ĉe la lasta domo de la vilaĝeto, fine de 50-metra vojeto novgudrita.

\* K A R L S R U H O  
\*\*\*\*\*

Pro invito de la E-grupo de Karlsruhe, k-ino Lépeix enkondukos la 26an de majo je la 15a horo (germana tempo) debaton pri : impresoj de junulino, kiu korespondas kun malliberuloj. La kunvenoj de la Esperanto-grupo de Karlsruhe okazas kutime sabate en la domo de Carl-Duisberg-Gesellschaft, Kaiserallee 111 A.

\* T A R N G A R O N I O

\*\*\*\*\*

Esperanto-kurso denove okazas en Montauban :

Kulturcentro, 5 rue des Augustins, ĉiumerkrede, je la 18a30.

\* O R I E N T A J P I R E N E O J

\*\*\*\*\*

En Perpignan plu funkcias la esperanto-kurso dank'al la senlaca gvidado de S-ro Llech-Walter. Dank'al lia agado ni certe sukcesos ricevi pli belan kaj pli taŭgan lokon por la venontjaraj kursoj.

Krome, ni ricevis en Perpignan la viziton de pola samideano, kiu prelegis en la Palaco de l'Kongresoj kaj montris lum-bildojn pri arkitektarto en sia lando; tradukis franclingven S-ro Amouroux.

\* A Ĝ E N I O

\*\*\*\*\*

Dimanĉon 6an de majo, en CLAIRAC (Junuldomo) en la kadro de nia regiona renkontiĝo, okazos la ĝenerala asembleo de Aĝenia E-Rondo. Ĉiuj AERA-anoj klopodu partopreni tiun kunvenon plej gravan por la estonta aktiveco de nia grupo. Tagordo : bilanco pri la ĝisnuna aktiveco. Nuna stato de nia grupo. Elekto de nova responsularo. Fiksado de la venonta agprogramo.

\* R E G I O N A R E N K O N T I Ĝ O en C L A I R A C (F47):

\*\*\*\*\*

Nur malmultaj anoncis pri sia intenco ĉeesti en Clairac la 5an kaj 6an de majo. Lastmomentaj interesatoj povos telefone averti kdon SIMONET : 79 50 23.

Bonvolu relegi la programon en "Laŭte!" de aprilo !

La grupoj aŭ kursgvidantoj, kiuj intencas trapasigi ekzamenon unuagradan, havos tiun okazon en CLAIRAC, sabate la 5an de majo, dum la posttagmezo. Sin anoncu tamen la kandidatoj al kdo SIMONET (jam pluraj estas enskribitaj).

Nia regiona renkontiĝo estos rendevuokazo por la geamikoj el pluraj departementoj. Jam sin anoncis partoprenontoj el Tarngaronio, Ĝirondio, Lotgaronio. Aliaj estos bonvenaj !  
Ĝis baldaŭ !

\* Kaj nun ni cerbumu pri la venonta somero ! Kie plej trafe kaj plej agrable pasigi feritagojn ? Al la jam de longe kutimaj kaj konataj okazoj (mondkongresoj, Grezijono,...) ni volonte aldonas jenajn :

\* De la 16a ĝis la 23a de septembro : Esperantista Semajno ĉe Maro (Sète) : legu en "Laŭte!" de aprilo.

\* De la 11a ĝis la 16a de aŭgusto : La "Instituto pri Mondan-istaj Studoj" kunvenos en kastelo "La Lambertie" apud Ste Foy-la-Grande (Ĝirondio). En la programo estas antaŭ-vidita Esperanto-Tago dimanĉon 12an de aŭgusto (prelegoj kaj diskutoj matene, promenado posttagmeze). Ĉiuj regionaj geesperantistoj nepre partoprenu almenaŭ okaze de tiu Esperanto-tago !

Jen la provizora programo por la tuta semajno :

- "La homaro, jura persono" de Paul de LA PRADELLE.
- "Limigoj de la Nacia Suvereneco necesaj al la kreo de Monda Federacia Aŭtoritato" de Max HABICHT.
- "Paragrafo 28 de la Kontrakto de la Homaj Rajtoj" de Max HABICHT.
- "La Internaciaj Organizoj, la monda komunaĵo kaj la iro al unueco", de John ROBERTS.
- "Formiĝo de la homo antaŭ siaj planedaj respondecoj", de Jacques MÜHLETHALER.
- "La mondanismo pere de la eduko kaj instruo", de Marc GARCET.
- "Suvereneco : de Bodin al Kant", de Jacques TRUCHOT.
- "La Federaciismo kiel la sola sistemo, kiu superpasas la suverenecon" de Guy HERAUD.
- "Heredo de la mondanista instruisto" de Lucile GREEN (probable en angla lingvo, kun traduko).

Ĉiuj tiuj prelegoj okazos en la kadro de la ĝenerala temo: "La Nacia Suvereneco en la 3a jarmilo".

\* E S P E R A N T O - S E M A J N O (J) en Moulin de Carguessac, 47470 Beauville, Lotgaronio) :

Temas pri neformala kunvivado en kampara regiono. La "programon" fiksas la ĉeestantaro mem laŭ ĉies preferoj.

Ĉi-jare du periodoj estas sugestitaj :

- de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto ;
- de la 25a de aŭgusto ĝis la 1a de septembro.

sed ankaŭ inter tiuj periodoj povos restadi tiuj, al kiuj tio plaĉos. Jen nun kelkaj pliaj sugestoj :

Manĝado : Jen ĉefa aktivado en "Carguessac" ! Eblas kolektive aĉeti kaj prepari la manĝojn (ege monŝpariga formulo), sed ĝisostaj individuistoj povas tamen aparte prepari sian dieton...

Tranoktado : Eblas tendumi aŭ loki ruldomojn. Kiuj ne posedas tendummaterialon aŭ ne povas kunporti ĝin, tiuj povas tranokti en la muelejo (estas kelkaj malnovaj matracoj)...

Pasigi la tempon... : La tempo pasas eĉ kiam oni nenion faras. Sed iuj tamen volas helpi ĝin. Eblas konversacii, debati, piede promenadi (biciklemuloj alportu sian ĉevalon), kune perfektigi en esperanto, sin bani, muziki, botanikumi, ktp... Geŝvitemuloj povas purigi, komfortigi la restadejon, masoni, ĝardeni, konkrete helpi en teda broŝureldonado, ktp. Do, eĉ la masohistoj povos diboĉi.

Tiu "afero" funkcias jam de tri jaroj. Ĉiu periodo havis apartan karakteron pro la personecoj kaj emoj de la diversaj geĉeestantoj. Kaj la vetero havas decidigan rolon.

La pasintjara partoprenantaro deziris pli zorge difinitan organizadon (ĉefe pri la diversaj taskoj necesigataj de la kolektiva vivo), kaj konkretan aktivadon. Laŭ la ĝisnunaj spertoj manlaboro prefere okazu kiam ne tro varmas, debatoj kaj E-lernado kiam ĉiuj emas al pigrado, ekskursoj kiam la vetero komplezas : ĉio laŭ la plej simpla logiko. Sed la principo restas, ke decidus mem la ĉeestanta kolektivo, aŭ nenion decidus, se tio estas tro laciga.

Ne ĉiujn problemojn solvas tiu liberdona formulo ! Nura konsilo : ne trudi tabakfumon al neŝatantoj.

Ĉiu interesat(in)o bonvolu anonci al

C.Baudé, Gare SNCF, F 47340 Laroque Timbaut

- la periodon de sia restado ;
- sian tranoktad-manieron ;
- kiel (ŝi) li intencas partopreni, ktp...

Ĝis !

\*\*\*\*\*

\* T U L U Z O : Du sukcesoj en la Atesto pri elementa lernado (kdoj PONTNAU kaj SAVARIC).

\* C A H O R S : Sekve de informkunveno pri esperanto plura raj personoj lernas aŭtodidakte, sed kunvenas de tempo al tempo por interhelpi unu la alian.

Interesatoj rilatu kun : R. CUQUEL, 209 r.Dr Ségala F 46000 CAHORS.

"La polico estas la plej granda plago de nia epoko. En ĉiuj landoj, ĉefe en la civilizitaj landoj. La plago de nia epoko estas nek la malsato nek la militoj, nek la pesto, sed la polico. La polico kulpas dekoble pli da murdoj kaj krimoj ol ĉiuj murdistaroj kune. Kaj la krimoj de l'polico neniam estas punitaj".

Jen tipe kalumnia aserto, kiu fontas el C.V.GHEORGHIU

"Les Immortels d'Agapia", Ĉap.XX.

Ni ne scias, ĉu la ĝendarmoj estas forrabistoj, sed ekde nun

PROKONSCIENCAJ OBJĜETANTOJ = BANDITOJ

Komuniko de la eks-Fedo :

"Mardon la 27an de februaro, la civila tribunalo de Nancy disigis la Federacion de Objĝetantoj.

La socia celo de la Asocio, deklarita la 29an de junio 1978 ĉe la prefektejo de la departemento Meurthe-et-Moselle konforme al la leĝo de la 1a de julio 1901, estis priskribita jene :

La Asocio nomata "Federacio de la objĝetantoj" (pli simple nomata "Fedo") celas reprezenti kaj defendi la personojn, kiuj deziras esti, aŭ estas, prokonsciencaj objĝetantoj. Hieraŭ la Fedo, kiu organiziĝis en la tuta Francio, ekhavis la subtenon de multaj moŝtoj, asocioj, movadoj, politikaj partioj, sindikatoj kaj eklezioj.

Ĉu la aŭtoritatoj povas toleri tiun atencon kontraŭ la libero pri asocio, dum nia Prezidento de la Respubliko dissendas alvokon al dialogo ?

La volo de la objĝetantoj estas renkonti la aŭtoritatojn por havi la starigon de alia civila servo, kiun ĉiu juĝas nepre necesá. Nun la respondo al tiu peto estas la disigo de Fedo: jen la koncepto pri dialogo, kiu riskus trudi al la objĝetantoj aliajn luktorimedojn.

La Objĝetantoj por Alia Civila Servo petas ĉiujn organizaciojn asociojn, partiojn, sindikatojn kaj ekleziojn sin levi kontraŭ tiu atenco kontraŭ la rajtoj pri asocio kaj subteni la Fedo-n dum la apelacia proceso.

Tiel la slogano de Fedo "Ne proceso, sed traktadoj" pli vigle resaltas kaj integriĝas en la perspektivojn por renovigo de la civila servo :

- libere elekti la lokon de la civila servo
- esti leĝe reprezentataj en la instancoj pri decidado kaj



kontrolado de la civila servo

- renovigi la civilan servon en la kadro de asocioj
- povi partopreni en la esploro pri alia defendo
- servi dum tempo egala al tiu de la soldatservo
- liberigo el la devo servi kaj amnestio por ĉiuj civil-servrifuzantoj de 2 jaroj.

Tiucela paŝo estas nun farata ĉe la prefektejoj kaj ĉe la ĉefministro, tiu paŝo montras la kapablon kaj la volon de la obĵetantoj kaj de iliaj simpatiantoj sin doni al pozitiva movado por la obĵetado"

Subskribis : Obĵetantoj por alia civila servo

\*\*\*\*\*

### NOVA VORTARO (serioza k humura)

aktoro : stranga ekzistaĵo : jen simio, jen saĝulo, jen cigano, jen maljuna virino, jen heroo, jen kriplulo, jen malsaĝulo, jen tio, jen alia, sed perfekta homo - n e n i a m.

altaĵo : de tie oni povas fali kaj rompi la kapon, sed malgraŭ ke ĝi estas tre danĝera loko, la homoj tamen rampas tien, metante sian vivon en danĝeron.

amo : malvera kalkulilo : du ĝi kalkulas por unu.

bifstekoj : por la dentoj de malriĉulo estas ĝi tre malmola.

bopatrino : la plej bona bopatrino ne egalas la patrinon.

ciganoj : popolo, kiu dancas, eĉ malsata.

cirko : loko, kie ĉevaloj akiris monojn de homoj.

ĉevaloj : per ilia forto la homoj fariĝis civilizantaj, kaj ili mem ĝis nun restis ĉevaloj.

dolĉe : ordinare finiĝas maldolĉe.

doni : tre malfacila laboro, kiun ne ĉiuj povas fari.

edziĝo : komedio, kiu ordinare finiĝas per tragedio.

espero : infana ludilo : Oni ludas per ĝi, ĝis ĝi rompiĝas aŭ disŝiriĝas.

filo : unu patro povas nutri dek filojn, sed dek filoj eĉ unu patron ne povas nutri.

(finota)

### La belaj paĝoj de "Laŭte!" :

La papoj estas neeraripovaj ...

\*\*\*\*\*

"Kiam Fokas suriris la imperiestran tronon, post kiam li mortigis la imperiestron Maŭrico, li ricevis jenan leteron de l'papo Gregorio la I-a : "La Ĉiopovulo elektis vin, por ke vi sidiĝu sur la trono; ĝoju la Ĉielo kaj ektermu la tero pro feliĉo..." Fokas ne forgesis tion, kio estis farita por li kaj starigis la superregecon de la episkopa Roma sidejo super la aliaj. Papo Gregorio elpensis la purgatorion. Papo Honorio estis kondamnita de alia papo en 625, ĉar li oficiale instruis herezaĵon. En 1870, la Vatikana Konsilio proklamis la neerarecon de ĉiuj papoj, kiam ili parolas "ex cathedra" t.e. oficiale. Kiel do klarigi, ke Honorio la I-a estis oficiale proklamita herezulo ?

Johano la VIII-a teruris la nekonvertitojn ; ĉar li serioze ofendis unu el siaj fidofratoj, tiu ĉi provis veneni lin. Ĉar la veneno ne sufiĉe rapide efikis, la fratomurdanto finis sian verkon mortmartelante Johanon.

Stefano la XII-a estis ofendita de sia antaŭulo, kiu antaŭe senigis lin je la papa trono. Unua ago de Stefano, kiam li iĝis papo, estis la elterigo de l'korpo de papo Formoso, kiu li kripligis kaj poste ĵetigis en la riveron Tibero. Poste mortstrangolis Stefanon alia fidofrato.

Kristoforo, kiu vivis ĉirkaŭ la 900-a jaro, aŭdace detronigis sian antaŭulon Leonon la V-an, deklarante lin netaŭga por regi, kaj tio verŝajne veris. Leono mortis pro aflikto en malliberejo, malpli ol 40 tagojn post sia surtronigo.

Kristoforo mem estis murdata de sia posteulo Serĝo la III-a (903-911). Tiu ĉi senhonorege kondukis; lia amatino, Marosia naskis al li plurajn infanojn. Johano la X-a kaj Leono la VI-a, postvenantoj de Serĝo la III-a, estis ambaŭ mortigitaj de Marosia, por ke ili cedu lokon al aliuloj, kiujn ŝi pli ŝatis. Johano la XI-a estis frato de Marosia kaj de Serĝo la III-a; unu el liaj fidofratoj venenis lin. Johano la XII-a estis murdata, kiam li estis malĉastanta; li plenigis la Latranan palacon per nepriskribeblaj seksdiboĉoj; unu el liaj amatinoj estis Johana, konata sub la nomo de Papino Johana.

El "La Dia Revelacio" (1953?)

ĉap.III La Pergama epoko

Skribis: "Sendito de l'Eternulo"(!!!); trad. R.Pontnau.

Ĉe la broŝurservo :

"Katastroplano pri la atomcentralo de Fessenheim. Verdikto de Wyhl". Oficialaj tekstoj tradukitaj de Jacqueline Lépeix. LJP-broŝuro 133 B. 5 FF.

Kiuj serĉas en legaĵo nur agrablan distrilon, tiuj ne aprecos tiun broŝuron. Sed ĉiuj, al kiuj nenio homa estas fremda; ĉiuj, kiuj deziras kontraŭi hommortigajn danĝerojn kaj defendi la naturon, legos ĝin malrapide, kun streĉa atento kaj pasia intereso.

La regantoj dormigas la popolojn per trankviligaj informoj, argumentoj kaj rezonadoj, laŭ kiuj la atomcentraloj estas sendanĝeraj, aŭ nur tre etdanĝeraj, eĉ pli ol aliaj energifontoj. Ili aplombe mensogas, ĉar ili mem tre bone scias la veron, kiun ili tiel kaŝas. Tion pruvas la oficiala katastroplano (oficiala sed sekreta) interkonsente ellaborita inter francaj kaj germanaj aŭtoritatoj. Malgraŭ la sekreto kelkaj kuraguloj sukcesis ŝteli la tekston de tiu plano el germana oficejo. La broŝuro enhavas tradukon de kelkaj paĝoj el tiu teksto. Legante ĝin, oni ricevas teruran impreson.

Sekvas ekstrakto el verdikto de la tribunalo de Freiburg-Breisgau, kiu, pro forte argumentitaj motivoj, malpermesis la konstruadon de atomcentralo en Wyhl (Badenlando). La landaj aŭtoritatoj kaj la eventualaj konstruantoj apelaciis, sed ĝis nun ili ne ricevis permeson.

Dume, en Francio, la centralo de Fessenheim estis konstruita kaj ekfunkciis.

Pri la konformeco de la traduko je la germana originalo oni ne povas juĝi, sed verŝajne ĝi estas bona, ĉar la esperantigita teksto estas klara, malgraŭ tre teknikaj precizaĵoj. Tiel laŭ gramatika korekteco kiel laŭ stilo, nia Jaklino faris bonegan laboron. Kaj utilegan !

Valo.

"Sindikatismo - Sovetoj" de Anton Pannekoek. Esperantigita de Kribo. 28 paĝoj, 3 FF. Recenzo en venonta "Laŭte!". Jen la tezo de A.P. : "La vera organizo, kiun bezonas la laboristoj en la revolucia procezo, estas organizo, en kiu ĉiu partoprenas, korpe kaj mense, tiel en la agado kiel en la gvidado, en kiu ĉiu pensas, decidas kaj agas...(...). La profesiaj gvidantoj ne havas lokon en tia organizo. (...) La tuta potenco ĉiam koncentriĝos en la manoj de la laboristoj mem..." Laŭ A.P. tiu organizo estas la "soveto", t.e. "la laborista konsilio". Tiuj tekstoj aperis en ...1936 !

Nia felietono : TRA LA MONDO PER BICIKLO...  
\*\*\*\*\*

Pri Nikolajev du memoraĵoj elstaras : senfina boatponto, mast-arbaro, uzinoj kun fumantaj kamenoj kaj la renkontiĝo (dank'al la esperantistoj) kun veterano el la krimea milito inter la blanka kaj ruĝa armeoj.

Tiu ĉi estas kuracisto, junulo 25-30-jara, kiu iom parolas la francan. Li rakontas al mi la lastan batalon de la revolucio, okazintan en istmo de Perekop, kiu ligas Krimeon al la kontinento. La blanka armeo estis pelita al la maro far la ruĝa armeo kaj la obstinega batalo okazis preskaŭ nur en la akvo.

Tiam tiu kuracisto estis ordinara laboristo kaj partizano. Li estis citita kaj rimarkita pro siaj brilaj faroj kaj tuj post la fino de l'milito li eniris en fakultaton por lerni medicinon, ĉar en tiu epoko granda parto el la rusa elito estis detruita aŭ ekzilita kaj tial la revolucio tuj favoris en siaj vicoj la kreiĝon de nova elitaro : scienculoj, inĝenieroj, agronomoj, k.c.

Elirinte el Kherson, ni tuj celis rekte la istmon de Perekop. Fakte, kiam ni atingis ĝin, se oni ne estus nin avertintaj, ni verŝajne eĉ ne provus trapasi. Efektive, en sia plej malgranda parto ĝi konsistas en tiu sezono el apenaŭ 100 metrojn larĝa rubando el sablo pli-malpli moviĝema. Maro, ĉielo kaj sablo konsistigas la kampon de la batalo, kiu okazis tie 7-8 jarojn antaŭe. Ni mem, kun niaj peze ŝarĝitaj bicikloj, devis vadadi pli ol du horojn por sukcesi traŭri kaj eliri el tiu nefirma pasejo.

Elirinte el la istmo, ni malkovris spuron de tervojo por karavanoj. Tie la dezerto kaj la bestaj ostaroj blankigitaj kaj poluritaj far la rabbestoj atestas pri la sekeco de la regiono. Ni povis antaŭeniri nur kelkajn centojn da metroj hore en tiu moviĝema sablo. Feliĉe por ni, alvenis ĉaristo, kiu konsentis, ke ni ligu niajn biciklojn malantaŭ lia ĉaro, kiu posttrenis nin dekkvin kilometrojn.

Tiu viro tuj vidis, ke ni estas fremduloj kaj rapide li komprenigis al mi, ke mi estas bonŝanculo : sur la sama vojo, je proksimume 40 km-oj, troviĝas gastejo mastrumata de francino. Mi ege penis por kompreni liajn klarigojn, sed mia surprizo egalas mian ĝojon alveni en loko, kie mi povos paroli kaj peti informojn libere kaj facile.

Tamen, tiel aĉa estis la stato de la tervojo, ke ni povis

atingi la celon nur la postan tagon ĉirkaŭ tagmezo sub bril-ega suno (Ni estis fine de oktobro).

Efektive, la tervojo fariĝis pli uzebla kaj pli oftaj la vilaĝoj. Jen, ĉirkaŭ tagmezo, ni atingas vilaĝegon nomitan (mi kredas) Armyansk. Ne eblas erari : sur la publika placo, ĉe la rando mem de la vojo, la plej bela domo. Jen estas tie. Estus malfacile diri, kiu, ĉu nia gastigantino, ĉu mi, estis plej surprizita. Post akcepto komence malvarma, ŝi rakontis al mi sian historion. Ŝi estas 40-50-jara, bela virino. Ŝia edzo posedis antaŭ la revolucio en tiu regiono belan kaj vastan bienon, kie troviĝis krom la ĉefa muelejo el la regiono, ankaŭ multaj farmoj kaj la domo, kie ni estas. Tiu domo estis oazo, ĉevalŝanĝejo, gastejo, tial ke en 50-kilometra ĉirkaŭo nur ĝi posedas neelĉerpeblan puton el trinkebla akvo. Imagu la valoron de tia trezoro, dum la malmultaj aliaj akvoputoj en la regiono liveras nur salgustan pli-malpli kotplenan akvon !

La revolucio lasis al ŝi nur tiun domon kaj la valoregan puton. La nova reĝimo permesas al ŝi zorgi pri sia antaŭa afero : akvo, ĉevalejo, dormoĉambroj, ktp... Ŝia eksedzo vivas en unu el la antaŭaj farmoj...

Post unu nokto sub ŝia tegmento ni ree ekiris. Celo : SIMFEROPOL, administra ĉefurbo de Krimeo.

Kvankam ege difektita, la vojo de la karavanoj ekzistis. De tempo al tempo ni trovis jen petrolodukton, jen embrion de konstruata fervojo. La lando : stepo, dezerto, suno, sablo, blankiĝintaj ostaroj, monotona ebena regiono, sed ankaŭ la danĝero de malfirma sablo ĉefe kiam necesis trairi la malmultajn riveretojn.

Ni tamen renkontis kampadejon de riĉaj nomadoj kaj du ĉasant-ojn. Unu parolis la francan. Li rakontis al mi, ke ili estas du eksaj uzinposedantoj, restis direktoroj, sed, bone salajrataj, ne plu havas la antaŭajn zorgojn. Kiel ĉiuj salajruloj ili ĝuas feriojn kaj eĉ ĵipon, per kiu ili povas sin dediĉi al ĉasado.

Baldaŭ ĉe la horizonto aperis nekutima preĝejturo : minareto. Efektive, la praloĝantaro de Simferopol estis muzulmana. Konfirmas tion la burmusoj, kiujn ni baldaŭ renkontis. Tiam, Simferopol estis vilaĝego premita de la suno. Tamen ni trovis tie indiĝenajn kaj rusajn esperantistojn.

(daŭrigota)

BOTANIKO : Jen nova letero de amiko Alain MATSCHEK, kiel sekvo de tio jam aperinta sur p. 8. Kiuj eklegas "Laŭte!" ekde la lasta paĝo, tiuj bonvolu esti komprenemaj al la konformismemo de la tajpanto.

"Karaj geamikoj de l'botaniko,

Nu! mi estas ĵus solvinta la problemon pri la buterfloro de l'diablo helpe de mia patro. Mia patro estas nek botanikisto nek botanikamanto. Sed lia gepatra lingvo estas la germana lingvo. Kaj li diris al mi, ke "buterfloro" tute certe estas la traduko de la germana vorto "Butterblume". Li komprenis la vorton "buterfloro", ĉar ankaŭ li estis esperantisto. Mi diras "estis", ĉar li nun preferas studi la rusan lingvon...

Do! mi prenis la vortaron "Allemand-Français" kaj legis :

- Butterblume : 1. renoncule, bouton d'or  
2. souci d'eau  
3. pissenlit

Tute certe Zamenhof tutsimple faris per la vorto "Butterblume" la vorton "buterfloro". Kaj buterfloro estas aŭ ranunkolo aŭ kalendulo aŭ leontodo. Tute certe pro sia tokseco ranunkolo estis kromnomata "buterfloro de la diablo" kaj pro eraro oni envortarigis la esprimon "buterfloro de la diablo" ĉe la vorto "leontodo" en la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. ...."

A. Matschek.

\*\*\*\*\*

Ĉe la broŝurservo de SAT : Ĵus aperis, ofsete reeldonita, "Vortoj de Kamarado E.Lanti" !

Samtempe malaperis tuta hartufo el la kapo de la freneza ofsetulo, kiu veante konstatis la neblon perfekte represi tiel valoran verkon. La dika broŝuro (192-paĝa) estas tamen de nun havebla (15FF al La Juna Penso, F 47340 Laroque, pĉk Bordeaux 3 374 04 M).

Pluraj kompatemaj geamikoj petis kiel kunlabori konkrete al la broŝureldonado. Estas tre malfacile helpi, ne estante sur la loko, kie troviĝas la eldoniloj, folistokoj kaj papertranĉilo. Sed surloke estas ĉiumomente multe da laboro. Do, ĉiu ŝvitemul(in)o estas ĉiumomente bonvena por tre diversaj taskoj. Al kiuj volas helpi en sia propra loĝloko mi povas nur sugesti jenajn ŝvitokazojn : lingve kontroli manuskriptojn, desegni frontpaĝojn aŭ internajn ilustraĵojn, tajpi, disvendi broŝurojn en loka grupo aŭ en kongresoj...

Plej kore antaŭdankas,

Kribo

Panaït Istrati naskiĝis en Braïla (Rumanio) en 1884. Lia patrino estis tuklavistino kaj lia patro, kiun li neniam konis, greka kontrabandisto.

Kiam 12-jara, li forlasis la hejmon de sia patrino kaj foriris vagadi tra la mondo. Li travojaĝis Egiption, Sirion, Libanion, Grekion, Italion, Francion, praktikante ĉiujn laborojn laŭ la hazardo de la okazaĵoj : kelnero en drinkejo kaj kukisto, meĥanikisto, dokisto, domfarbisto, fotografo...

Li partoprenis en la revolucia movado de la dokistoj en Braïla, sed ĉiam rifuzis la dogmon de politika partio.

Li konis la mizeron, la malesperon kaj provis sin mortigi en Nico, kie li konatiĝis kun Romain Rolland.

Li lernis aŭtodidakte la francan lingvon, kiu estas la lingvo de preskaŭ lia tuta verkaro konsistanta el :

1. La Vivo de Adrien Zografi, aŭtobiografio, en kiu li rakontas sian aventureman vivon.
2. La Rakontoj de Adrien Zografi, plenaj de la koloroj kaj de la vigleco de la Oriento.
3. Atestoj, i. a. tri libroj pri Sovetio, kiun li vizitis en 1929, logita de "la alia flamo". Li revenis elrevigita, rapide vidante, ke la revolucio estis perfidita. Li raportis objektivite pri la faktoj. Tiam li estis forlasita kaj kalumniata fare de la komunistoj.

Panaït Istrati mortis pro ftizo en 1935. Li estis talenta verkisto kaj vera amanto de libereco, "la homo, kiu aliĝis al nenio" ! Oni povas konsideri lin kiel anoncanton de Jack Kérouac : la vagulo de "Sur la Route" kaj "Les clochards terrestres" ("Sur la vojo" kaj "La teraj trampoj").

Bedaŭrinde, lia verkaro estas grandparte elĉerpita. Oni esperas baldaŭn reeldonon.

Pri Panaït Istrati oni povas legi (en la franca) du librojn :  
\* Panaït Istrati "Un chardon déraciné" de Monique Jutrin Kienner, Eld. Maspéro.

\* Panaït Istrati, vagabond de génie : Edouard Raydon, 18 FF, ĉe La Amikoj de Panaït Istrati, 42 rue du Dr Santy F 26000 Valence

J.G.

\*\*\*\*\*  
\*  
\* La venonta numero de "Laŭte!" aperos meze de junio \*  
\*  
\*\*\*\*\*

Kara abonant(in)o de "Laŭte!" !

Meze de tiu ĉi numero vi trovis la novformulan "Adresaron", kiun vi bonvolu mem faldi, agrafi kaj tranĉi por pli oportuna uzado. Geruzuloj povas antaŭ ol agrafi la tuton, ankaŭ enŝovi virgajn samformatajn foliojn, sur kiuj eblos noti la aldonojn kaj modifojn, kiuj poste aperos en la bulteno.

Por pli ampleksa adresaro, mem diskonigu "Laŭte!", sendante al ni adresojn, al kiuj ni sendos senpagan specimenon via-nome. Tio estas la plej bona maniero konigi nian bultenon al homoj, kiujn vi ŝatas ! Dankon !

Ni faru el "Laŭte!" ĉies esprimilon !

La red.

\*\*\*\*\*  
Nova vortaro (daŭrigo)  
\*\*\*\*\*

floro : eĉ se ĝi estas bela kiel la tuta mondo, ĝia radiko devas esti en la tero.

frato : frato povas esti ĉiu, kiu havas monon.

flataĵo : ŝlosilo al ĉiuj koroj.

haringo : manĝaĵo, kiu donas apetiton al riĉuloj kaj satigas malriĉulojn.

honesto : antikva komercaĵo ; en la nunaj vendejoj ĝi estas malofta.

kartoj : rabisto, formanganta monon, tempon, sanon kaj honoron.

korto : loko por malriĉuloj ne havantaj loĝejon.

lombardujo : returnita mondo : somero tie estas vintro kaj vintro - somero.

malsato : severa kaj terura koloremulo, pelanta en la randon de la mondo.

mi : signifas : krom mi, ne ekzistas alia en la tuta mondo, mi povas ĉion, mi bezonas ĉion. Al mi estas ĉio permesita - kaj mi estas nome mi.

nenio : materialo, el kiu Dio kreis la mondon.

nulo : utilas por la alia sed ne por si mem.

petrolo : fluidaĵo lumiganta alion, kaj ĝi mem mallumas.

redakcio : mensogfabriko.

sekreto : virinoj transdonas ĝin unu al la alia.

vero : malfeliĉa ekzistaĵo; preskaŭ la tuta mondo malamas ĝin !

Anonimulo.